

# SUBTRANCIA STILO

\*\*\*\*\*  
Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"  
Jarabono: 20 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon  
CCP 956-28 P Montpellier  
\*\*\*\*\*

4a Kvaronjaro 88

N° 107

# UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

## ANTAŬKONSIDEROJ

*Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,*

*Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj,*

*Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,*

*Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,*

*Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,*

*Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,*

*Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevido,*

Trial. Mun.  
LA ĜENERALA ASEMBLEO  
proklamas

TIUN ĈI UNIVERSALAN DEKLARACION DE HOMAJ RAJTOJ kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiu Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

## Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus kondukti unu al alia en spirito de frateco.

## Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, neniu diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

## Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

## Artikolo 13

- (1) Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.
- (2) Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

## Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, scienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

## Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

## Artikolo 20

- (1) Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.
- (2) Neniu estu devigita aparteni al asocio.

## Artikolo 26

Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasoj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

La Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj estis akceptata de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj je la 10a de Decembro 1948, do antaŭ precize 40 jaroj. Ĝi antenas tridek artikolojn.



Aŭgusto 1789, Decembro 1948, en ambaŭ kazoj en Parizo, Deklaracioj pri la homaj rajtoj... Kaj nun, fine de 1988, laŭ la lasta raporto de "Amnestio Internacia" en pli ol la duono de la ŝtatoj membroj de la "Unuigintaj Nacioj" ekzistas malliberuloj pro opinioj. La "grandaj" ideoj progresas malrapide! Kompare, Esperanto multe progresis en unu jarcento kaj ni povas esperi...

Por tiu numero de SFS, alvenis multe da materialoj; ni povintus plenigi duoblan numeron sed financoj ankaŭ konas limojn! Estas substrekinde, ke por la unua fojo de longe aperis informoj pri Esperanto en la gazetoj de ĉiuj departementoj de nia federacio. Gratulojn al ĉiuj! Pri diversaj iniciatoj vi povos legi en tiu-ĉi numero. Ĉe se ni skribis al la Ministro pri Edukado, la progreso de Esperanto dependas de NI. Al ĉiuj BONAN JARON 1989!

J. Hénin

P.S. Ne forgesu la limdaton, ĉiam indikatan sur la lasta paĝo. Pro la ne-respekto de tiu dato far kelkaj, tiu SFS okazigis kelkajn problemojn. Anticipan dankon!

#### AUTUNA LABORKUNVENO

Gi okazis en Peyriac de Mer dimanĉon la 9an de Oktobro en la salono de la 3a aĝo. Ĉeestis dudek partoprenantoj el diversaj urboj de la federacio; aparte oni povas menciigi tri personojn el Narbonne, kiuj intencas formi grupon en tiu urbo. La prezidanto Jean Hénin bonvenigas ĉiujn kaj senkulpigas la Nimajn esperantistojn, kiuj ne ĉeestas pro la pluvego.

Bilanco de la lastaj monatoj: La sperto de Villefranche sur Saône ne plu ekzistas, mankas la mono. Generale, malgraŭ la promesoj antaŭ la balotoj, la socialista partio nun ne estas tre favora al Esperanto. Nune pluraj homoj rekomendas la anglan lingvon. Tamen oni povas noti la novan leĝproponon, deponitan la 24an de februaro 1988 de Sro. Jean Raotta (Centristo), deputito en Bouches du Rhône (laŭ informo de "Norda gazeto"). Grava afero por la internacia lingvo: somere, la radiokursoj ĉe France-Inter. Dum sia elsendo Brigitte Vincent, kun la helpo de S-ro Richard Comerford, lernigis Esperanton dum dek minutoj ĉiumatene (krom dimanĉe). La aŭskultantoj povis mendi la flugfoliojn por profiti la kurson; sesmil aŭskultantoj estis kalkulitaj ĉe la Pariza redakcio. Ĉiuj en Francio povis kapti "France Inter". S-ino Négron proponis denove skribi al France Inter por nova elsendo de tiuj kursoj. Sekvis diversaj informoj pri la aktivecoj de la Esperantista movado: Avignon, Millau, Barcelono kaj Jorgos.

Raportoj pri la grupoj: Pri Béziers raportis S-ino Authier. La staĝo en Agde, kiel lastjare, okazos dum la ferioj de Ĉielirado, de la 3a ĝis la 7a de majo. La grupo preparas afiŝojn por anonci tiun staĝon. Pri Montpellier parolis S-ro Cayzac; la staĝo en Habère-Poche estis sukcesplena kun sesdek partoprenintoj. La adresan sliparon bone kompilas S-ro Cayzac. Finfine la forumo de la asocioj bone disvolviĝis. Perkoresponda kurso funkcias kun metodo de UFE por komencantoj. Pri Perpignan raportis S-ro Llech-Walter. Esperanto-radiokurso denove okazas dank'al la helpo de Fréquence-Sud en Argelès sur Mer kaj okazas en la Kultura Centro diversaj aliaj kursoj.

Pri la anonco de la federacio en la senpagaj gazetoj pri la perkorespondaj kursoj, ni ne trovis solvon pro manko da tempo. Por propagandi Jean Amoureux sugestis posedi propran leterstampilon; li mem uzas tiun metodon. Claude Cayzac klopodos pri la konkurso en gazeto; ni diskutos pri tio en la venonta federacia kongreso de Lezignan-Corbières. S-ro Bénazet el Perpignan gvidas esperanto-kurson en tiu urbo ekde la 15a de oktobro. S-ino Carbonnel Colette, malnova lernantino el Perpignan, klopodis por trovi gelernantojn en Lagrasse (Aude). Artikoloj kaj afiŝoj estas faritaj por anonci la kurson. La venonta federacia kongreso okazos en la "Maison des Jeunes et de la Culture" de Lezignan-Corbières la 15an kaj 16an de Aprilo 1989.

Sro Martinez vizitis nin. Instruisto en Portel des Corbières kaj Generala Konsilanto de Sigean, S-ro Martinez aŭskultis nin atente kaj poste faris demandojn pri la internacia lingvo kaj nia agado. Bonvole ĉiuj respondis la demandojn kaj klarigis. Nia prezidanto informis nin pri sia sano kaj pro tio deziras anstataŭigon (kiel eble plej malfrue laŭ mi) de la posteno de prezidanto. Do multe da laboro estis farita en tiu laborkunveno sed restas multe. Ni dankas S-inon Tora, kiu surloke tre bone zorgis pri la aŭtuna kunveno.

Protokolis la Sekretario Charles GERARD.

# KOTIZOJ

UFE/UEA - JEFO/TEJO : Kotizoj pagotaj al UFE 4, bis rue de la Cerisaie  
75004 Paris/Tel:16-1-48 87 07 42/pĉk-ccp 855 35 D Paris.

UFE:aktiva membro:215F;paro:325F/simpla m.:85F/m.de klubo 87:215F/dumviva m.:4300F

UEA:membro kun gvidlibro:40F/kun jarlibro:90F/kun jarlibro kaj "esperanto":225F  
dumviva membro : 5625 F

JEFO:"sympathisant":15F/aktiva membro (malpli ol 30j.):90F/Membro Jefe-Ufe:215 F  
studento:50F/Patrono:90 F.

TEJO:(ĝis 25 j.)Membro kun "jarlibro+Kontakto":90F / same+"esperanto":225 F  
Patrona membro ("jarlibro+kontakto"): 120 F.

\*\*\*\*\*

# ABONOJ

Kompreneble vi unue abonos SFS ("Sudfrancia Stelo"), kies prezo restas sensanĝa 20F  
Giru tiun sumon al : Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon  
pĉk/ccp 956-28 P Montpellier

Adreso de la kasistino Lucette Négron : 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel  
Tel.67 71 05 79

Aliaj utilaj adresoj:sekretario de la federacio:Charles Gérard 4,Rue Dr G.Rives  
66000 Perpignan Tel: 68 55 51 77

Tajpas la bultenon kaj prezidas la federacion: Jean Hénin Rte de Montcayroux  
48500 La Canourgue Tel: 66 32 86 36

Ekspedas la bultenon: André Capus 15,R.des Frères Platter 34000 Montpellier  
Tel: 67 63 15 21

\*\*\*\*\*

Vi povas aboni la diversajn gazetojn, revuojn, ktp

-ĉu rekte al ĉiu eldonanto

-ĉu pere de UFE

-ĉu pere de "Fédération espérantiste du Vaucluse" pĉk 5326 95 F Marseille  
ĉe André Delaye, La Farigoule, 26230 Colonzelle

\*\*\*\*\*

Kelkaj tarifoj: Espéranto-Vaucluse:15F Laŭte:40F Icem-Espéranto: 60F  
Kulturaj Kajeroj:65F Heroldo de Esperanto:115F(?) El Popola Ĉinio :90F  
(2 jaroj:150F 3 j.:210F) Monato:179F La Jaro:22,50F Literatura Foiro:155F  
Sat-Amikaro:120F Sat:190F La Migrantanto:40F

\*\*\*\*\*

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

Langvedoko-Rusiljono  
1987-88

INSTITUT FRANCAIS D'ESPERANTO

## SUKCESOJ EN EKZAMENOJ

Atesto pri lernado:

BEN SADOON Albert

BOLLE René (SB)

BONY René

CARBONNEL Colette (SB)

HEMERY René

F-ino LÊ Bich-Vân (B)

PASSARELLA Gisela (SB)

SOLERES Marthe (SB)

TORA Annick (SB)

A.pri praktika lernado:

F-ino LÊ Bich-Vân

PASSARELLA Gisela (B)

ROQUES Andrée

SCICLUNA Antoine (SB)

Gratulon al la sukcesintoj. Mi esperas trovi ilin venontjare kun pli  
altnivela diplomo.

La Direktorino de la Ekzamencentro:  
J.Vincent.

\*\*\*\*\*

"Sudfrancia Stelo" ankaŭ varme gratulas la sukcesintojn.



# TRA LA FEDERACIO

## BEZIERS

Venontaj kunvenoj : sabaton, la 7an de Januaro; dimanĉon, la 5an de Februaro kaj sabaton, la 4an de Marto.

7/1: je la 14a h. 1/2 - Reĝa festo - F-ino Roques prezentos "Vojaĝo en Bulgario", kun lumbildoj

5/2: je la 14a h. 1/2 - Kandelfesto, gustumado de krespoj. S-ro Akile Sanz prezentos prelegeton pri "Mondhejmo" de Caùduro (inter St Chinian kaj St Pons); je tiu okazo ni estus feliĉaj akcepti membrojn el aliaj grupoj por amika vizito.

Anoncu vin ĉe CBE, Tel. 67 31 13 18 aù 67 38 03 52

4/3: je la 14a h. 1/2 - monata kunveno

\*\*\*

Les prochaines réunions auront lieu les samedi 7 Janvier, dimanche 5 Février et samedi 4 Mars.

7/1: à 14h30 - Fête des Rois. A. Roques présentera "Voyage en Bulgarie" avec diapos.

5/2: à 14h30 - Fête de la Chandeleur, dégustation de crêpes. M. Akile Sanz présentera la "Maison du Monde" de Caùduro, entre St Chinian et St Pons.



A cette occasion, nous serions heureux de recevoir des membres d'autres groupes pour une amicale visite.

Faites-vous connaître au CBE, tel. 67 31 13 18 ou 67 38 03 52

4/3: réunion mensuelle

\*\*\*

"La Marseillaise" aperigis en Oktobro artikolon pri la radio-kurso de B. Vincent kaj la kursoj de la grupo. "Midi Libre" ne aperigis la artikolon pro konkurenco (mencio de "France-Inter")!

La teatra trupeto ludos en Lézignan okaze de la federacia kongreso (la 15an de Marto). Ni ankaŭ atendas aliĝojn por la staĝo de Batipaume (vidu la artikolon pri tiu staĝo). Ni presigis afiŝojn kaj volonte sendos kelkajn al vi. Kontaktu la CBE (adreso: 9 Rue Georges Picot 34500 Béziers, telefon-numeroj ĉi-supre)

\*\*\*

## LA CANOURGUE

Kurso funkcias en la kolegio kun dudeko da gelernantoj.

Kun la kunlaboro de J. Biré, A. Rocher kaj C. Cayzac, ni partoprenis en la forumo de la asocioj de Millau. Sufiĉe multaj personoj interesiĝis pri esperanto, inter aliaj geinstruistoj. Espereble ni povos baldaŭ fondi grupon en tiu urbo.

Pluraj personoj komencis la perkorespondan kurson.

Notinde, ke esperanto estis prezentata per moderna maniero, sur televidila ekrano (iom modifita programo de J-S. Brilleaud anoncita en la lasta SFS; fakte ne temas pri kurso sed pri prezento de la lingvo). Ni montros tiun programon en Lézignan.

Tiuj, kiuj veturos al la kongreso de Brighton, povas kontakti J. Hénin, kiu projektas viziton de Britujo post la kongreso. Tio koncernas aŭtomobilistojn. Pri vojaĝo per buso al Brighton, vidu la rubrikon "Nîmes". En ambaŭ kazoj, kontaktu SFS, ĉe J. Hénin Route de Montcayroux 48500 La Canourgue, tel. 66 32 86 36.

## LEZIGNAN-CORBIERES




Tie okazos nia federacia kongreso, la 15an kaj 16an de APRILIO. Rezervu la daton! La kongresejo estos la Kulturdomo (kie gejunuloj povos loĝi malmultekoste). La programo aperos en la venonta SFS. Prelegos S-ro Bénazet, el Perpignan, kiu instruas esperanton en la kulturdomo ekde lasta oktobro.



Pluraj gazetoj anoncis la naskiĝon de la loka esperanto-grupo, pri kiuj ankaŭ respondecas S-ino Carbonnel (Lagrasse) kaj Irène Espi. Gravas via ĉeesto en Lézignan por apogi la novan grupon. Manĝoj eblos en la kulturdomo. Vi povas jam rezervi hotel-ĉambron, ekzemple en "Hôtel du Luxembourg" Tel. 68-27-07-52 aŭ "Hôtel de la Gare" Tel. 68-27-01-37 aŭ iom pli luksaj "Tassigny" Tel. 68-27-11-51 kaj "Le Grand Soleil", tel. 68-27-01-20. Lézignan troviĝas je 20 Km okcidente de Narbonne. Ĝis!

\*\*\*





## Letero el Rimo



EN ĈIU MALBONO ESTAS IOM DA BONO. Zamenhof (Proverbaro)

La 3an de oktobro subita plago frapis nian urbon. Seshora fulmotondra pluvego plenigis riveretojn plejofte sekajn, transformis ilin en furiozajn torentegojn, kiuj invadis plurajn kvartalojn. Multaj viktimoj de tiu inundo vidis siajn domojn grave difektitaj aŭ tute detruitaj, siajn meblojn forportitaj, perdis siajn tutajn havaĵojn, kelkaj eĉ la vivon. En la daŭro de kelkaj minutoj nia urbo, kutime ridema, ricevis aspekton de profunda aflikto. Ĥaosaj amasoj el frakasitaj aŭtomobiloj kaj plej diversaj rubaĵoj, ravinigitaj avenuoj, elradikigitaj arboj, tradraŝitaj magazenoj...

En tiu malbonego tamen venis iom da bono, fare de la homoj. Jam en la unua tago organiziĝis savaj agadoj. Distribuado de akvo, de lakto, de pano kaj aliaj nutraĵoj, de litoj, kovertoj, varmigiloj, kuiriloj, tabloj kaj seĝoj. Ek de la morgaŭo alvenis el ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj urboj, eĉ el plej norda Francio, fajrobrigadoj kaj urbaj laboristaroj kun potencaj pumpiloj, levmaŝinoj, transportiloj kaj ĉiaj materialoj kaj ilaroj, trupoj da soldatoj, taĉmentoj da sindonemaj volontuloj. Ĉio ĉi glate funkciis en plenefike kunordigita organizo. Post kelkaj tagoj la urbo retrovis sian kutiman fizionomion kaj proksimume sian ĉiutagan vivoritmon. Dume alfluis malavaraj monhelpoj el tuta Eŭropo.

Persone mi ne suferis, nur kelkaj decimetroj da akvo en la kelo. Sed mi ricevis per poŝto, telegrafo kaj telefono vokojn de esperantistaj geamikoj, eĉ el Hispanio kaj Svedio, kiuj demandis, ĉu mi aŭ iu konato mia estis trafita de la katastrofo, kaj proponis helpon.

Kaj jen estas la "iom da bono": en tiaj malfeliĉaj okazoj oni spertas, ke solidarsento ne estas sensignifa vorto, kaj ke oni ne devas malesperi pri la homaro. Tia konstato varmigas la koron.

VALO.

### PERPIGNAN

La ĝenerala asembleo de la Kultura Esperanta Centro okazis la 29an de Septembro. Post kelkaj vortoj pri la agado de la pasinta jaro, oni diskutis pri la organizo de la kursoj: lunde-konversacia kurso; marde-perfektiga kurso; ĵaŭde-radio-kurso ĉe Fréquence-Sud de la 19a ĝis la 20a horo, en du partoj: tridekminuta kurso, tridek minutoj da muziko kaj babilado en esperanto.

Por la unua grado oni faros petan kurson, kiel la homoj deziras.

La Ĝenerala Asembleo aprobas la novan nomon de la sidejo: Kultura Centro de la Orientaj Pireneoj por Esperanto.

En la Centro estas konsulteblaj ducent revuoj. La biblioteko enhavas ducent kvindek volumojn.

### ĈE NIAJ NAJBAROJ

AVIGNON: 55 personoj partoprenis la kvinan rodanan rendezuon. Venontjare, la Rodana Rendezuo okazos... meze de la avinjona kamparo, la 14an k. 15an de Oktobro 89. Okaze de la Zamenhofa Tago prelegis Michel Duc Goninaz kaj montris lumbildojn S. Humm.

TOULOUSE: Debato okazis kadre de vespero aranĝita de okcitanistoj kaj esperantistoj. La 18an de Decembro kuniĝis esperantistoj el diversaj urboj de la federacio "Midi-Pyrénées" por tagmanĝi kaj reorganizi la federacion.

KATALUNIO: La lasta IFEF-kongreso (fervojistoj) kunigis en Perpignan 600 personojn el dudeko da landoj. La venonta IFEF-kongreso okazos en SALOU apud Tarragona, de la 13a ĝis la 19a de Majo.

41<sup>a</sup> INTERNACIA FERVOJISTA  
ESPERANTO-KONGRESO  
13<sup>a</sup> - 19<sup>a</sup> DE MAJO, 1989



\*\*\*\*\*

**STAĜO**

LINGVO-STAĜO DE ESPERANTO - STAGE DE LANGUE ESPERANTO  
 EN MAJO 1989 - AU MOIS DE MAI 1989

Loko/Lieu: Centre Batipaume, Route de Rochelongue 34300 AGDE (Hérault)

La staĝo okazos de la 3a de Majo posttagmeze (akcepto ekde la 16a h) ĝis la 7a de Majo. Ni intencas plilongigi ĝin ĝis la 10a de Majo, se sufiĉe da homoj deziras tion. Du kursoj okazos (inicado kaj perfektigo), eble tri. Post la 7a de Majo, nur konversacia kurso. Konigu al ni, se vi volas trapasi ekzamenon kaj kian.

LOGADO : Dulitaj ĉambroj, kelkaj unulitaj. Kompleta pensiono : 540 F por 4 tagoj / 945 F por unu semajno. Vi povas lui littukojn (25 F) surloke aŭ ilin kunporti. Kunportu tualet- kaj manĝo-tukojn. Antaŭpago por la restado : 150 F.

KOTIZO : 60 F antaŭ la 31a de Marto; 90 F poste.

Junuloj malpli ol 25jaraj ne pagas kotizon.

PLIAJ INFORMOJ : Cercle Biterrois d'Espéranto, 9 Rue G. Picot  
F 34500 Béziers

\*\*\*\*

Le stage aura lieu du 3 Mai après-midi (accueil à partir de 16 h) au 7 Mai après-midi. Nous avons l'intention de le prolonger jusqu'au 10 Mai, si assez de personnes le désirent. Deux cours auront lieu (initiation et perfectionnement), peut-être trois. Après le 7 Mai, seulement cours de conversation. Faites-nous savoir si vous voulez passer un examen et lequel.

LOGEMENT : chambres à 2 lits, quelques-unes individuelles. Pension complète : 540 F pour 4 jours / 945 F pour une semaine. Vous pouvez louer les draps (25 F) sur place ou les apporter. Apportez serviettes de table et de toilette. Acompte pour le séjour: 150F.  
COTISATION : 60 F avant le 31 Mars; 90 F ensuite.

Les moins de 25 ans ne paient pas la cotisation.

AUTRES INFORMATIONS : Cercle Biterrois d'Espéranto, 9 Rue G. Picot  
34500 Béziers

Tél. 67.31.13.18 ou 67.31.13.46 ou 67.38.03.52

A L I G I L O : BULLETIN D'ADHESION

Nomo kaj persona nomo (Nom et prénom):  
Adreso kaj telefon-numero  
(adresse et n° de téléphone)

Mi alvenos aŭtomobile - trajne / J'arriverai en auto -par le train  
la ...an de Majo je la ...horo le .... Mai à ... heures  
Se vi alvenos trajne, oni atendos vin ĉe la stacidomo, sed NEPRE indiku la horon.  
Si vous arrivez par le train, on vous attendra à la gare, mais indiquez l'heure.

Daŭro de la restado : 4 aŭ 7 tagoj / Durée du séjour: 4 ou 7 jours  
Nivelo de la kurso / Niveau du cours  
Ekzameno/examen: la 2a 3a grado (degré)  
Mi pagas / Je paie : 210F (150+60) ou 240 F (150+90)  
al/à : Fédération départementale espéranto de l'Hérault  
pck/ccp Montpellier 1.689.89 E  
Aliaj deziroj kaj informoj / autres souhaits et renseignements:  
persona ĉambro, "talentoj" por distroj ktp  
chambre individuelle, "talents" pour distraire, etc

Sendu la aliĝilon kaj la ĉekon (kun afrankita koverto, se vi deziras respondo) al:  
Envoyez le bulletin d'adhésion et le chèque (avec une enveloppe timbrée si vous désirez une réponse) à:

Fédération départementale d'Espéranto de l'Hérault  
9, Rue G. Picot F 34500 BEZIERS

# ALVOKO

por la perkorespondaj kursoj.

Ni bezonas perantojn en ĈIUJ lokoj de nia REGIONO.



Ĉu VI volas AGI kun NI ?

Nia metodo: a) Vi disdonu al personoj iomete interesataj la UNUAN RENDEVUON (RV) de la Metodo "Kvar" kun aldono de via adreso.

b) La persono plenigas kaj sendas al vi la RV. Vi korektas kaj resendas rapide kun la DUA RV...same pri la 3a, 4a, ktp, ĝis la NAŬA RV.

Metodo "Kvar" (Kontakti, Varbi, argumenti, Respondi) perfekte taŭgas por allogi komencantojn, ĉar ĝi aspektas pli LUDO ol kurso. La RVj agas kiel la logaĵo de la fiŝkaptisto.

Preskaŭ NEKONSCIE, kvazaŭ LUDANTE, la lernanto metas sian fingron en Esperanton.

Post la 9a RV la lernanto estas preta "ataki" la Metodon "11", kiu estas vere perkoresponda kurso. Ni disdonas lecionon post leciono kun ekzercfolio kaj studmaterialo.

Jam pli ol 120 personoj eklernas, el diversaj regionoj kaj diversaj landoj de Afriko.

Nun ni intencas disvolvi nian agadon en NIA REGIONO pro evidentaj kialoj. Se ĉiu el niaj PERANTOJ varbus kelkajn personojn, ni rapide atingus grandan nombron.

Kaj eĉ se vi ne povas aŭ volas esti peranto, vi povas EGE kontribui al nia kreskado. Kiel?

Sufiĉas, ke VI disdonu la lan RV kun nia adreso kaj ni prizorgos la aliajn rendezuojn.

Ĉu korespondantoj (por la 1a RV), ĉu perantoj, ni BEZONAS VIN kaj KALKULAS PRI VI.


Viaj konsiloj kaj sugestoj ankaŭ estos bonvenaj. Skribu aŭ telefonu por proponi vian KUNLABORADON kaj peti materialon aŭ pliajn informojn. NI MULTE ANTAUDANKAS VIN.

Adreso: Esperanto S/c Cayzac Res. Pic St Loup 171 Grand Mail 34080 Montpellier

Tel: 67 75 37 65

\*\*\*\*\*  
*Car la Afrikanoj kutime sendas nek respondkuponojn, nek poŝtmarkojn, nek monon, vi ankaŭ povas helpi per la sendo de kelkaj poŝtmarkoj, kiuj multege utilis. Anticipan dankon !*  
 \*\*\*\*\*

## KROZADO



sur la tre bela ŝipo "Chota Roustavelli" kaj la Mediteraneo. De Marseille (25/3) al Sicilio (Palermo), Tunizio (Tunis, Gabès), Malto (La Valette), reveno la lan de Aprilo (senŝerce).

Vi pasigos agrablan semajnon kun aliaj esperantistoj (ne mankos okupoj sur la ŝipo), ĉiutage vi vidos novan pejzaĝon kaj en pluraj lokoj vi renkontos esperantistojn.

Por pliaj informoj, kontaktu SFS au UFE (turisma servo).

Prezoj: de 4600 F ĝis 5900 F (ekskursoj ne inkludataj).

\*\*\*\*\*

Ci-sube alia propono de UFE, "semajno" antaŭ la UK de Brighton.

LA 81A FRANCA KONGRESO  
 DE ESPERANTO  
 OKAZOS EN V I C H Y  
 (12 V - 16 V)

E KSKURSOJ LUNDON (POST-  
 -TAGMEZE) + MARDON (TUTTAGE)  
 TAGA ALIĜO SURLOKE : 90 F  
 KOTIZOJ ĜIS LA 31/1/89 :  
 190 F (MEMBRIO DE UFE : 210 F)  
 PARO : 310 F (NE M. 320 F)  
 JUNULO : 120 F (NE M. 140 F)  
 EKSTERLANDANO : SENPAGE  
 (ALDONI 15 F POST LA 31/1)

PLIAJ INFORMOJ : ĉe SFS aŭ UFE.

## PARIZA FRENEZA SEMAJNO

Solenu la 200an datrevenonon de la Franca Revolucio, 22-29 julio 1989

La parizanoj estas gajaj homoj L.L.Z. (PIV)

Profitu nian frenezan semajnon kaj kontrolu la aserton de nia majstro!

Malkovru la ĉiaman kaj hodiaŭan Parizon!

**Konstatu, ke daŭre staras** la Eiffel-turo, la Kolono de la Bastilo, la Operdomoj, Katedralo Notre-Dame, la Louvre-Palaco, la Obelisko, la Panteono...

**Miru** pri la uzinaspekta Kulturcentro Pompidou, pri la Piramido ĉe la Kvadrata Korto de l' Louvre, pri la Kolonoj de Buren apud la Reĝa Palaco, pri la Civito de la Sciencoj kaj ties fama Geode (kun ĝia 1000-kvadratmetra ekranu), kie vi retrovos la impresojn de viaj praprageavoj spektante filmon de Lumière... ktp...

Sed ne nur monumentoj kaj muzeoj vidindas en Parizo: vi povos **butikumi ŝike** laŭ Elizeaj Kampoj kaj **popole** tra la pulbazaru de Saint Ouen.

Ankaŭ **frivole** vi spektos la mirindan revuon de la famkonata kabaredo **LATINA PARADIZO**

5500 F\*

Entenatas:

- luksa hotelo por sep noktoj,
- matenmanĝoj kaj ok luksaj manĝoj laŭ franca kulturo
- aro da vizitoj al muzeoj, luksaj spektakloj, panoramoj, unikaj neofte vizitataj kvartaloj
- esperantistaj ĉiĉeronoj kaj... transportoj.

Informilon kaj aliĝilon petu rapide de

Unuigo Franca por Esperanto

(Turisma Servo)  
 4 bis, rue de la Cersaie

F-75004 PARIS

\* 6400 F por unu-persona ĉambro

Pro spaco-manko ni prokrastas la rubrikon pri filatelio de J. Amouroux.

Same ni aperigos venontfoje informojn pri la diversaj staĝoj de la somero 89.

Ni nur memorigas vin pri utilaj adresoj, kie vi povos eventuale trovi informojn:

LA KVINPETALO / Suzanne BOUROT 86410 BOURESSE Tel.: 49-42-80-74

GRESILLON Kultura Esperanto-Domo 49150 BAUGE Tel.: 41-89-10-34/ 40-76-77-95

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA, poŝtfako 779, strato Postiers 27, CH-2301 LA CHAUX DE FONDS

Tel.: (+39) 26-74-07

\*\*\*\*\*

Kaj ne forgesu, ke en nia regiono okazos 2 staĝoj:



-komence de Majo en Agde (vidu la apartan artikolon)

-en Septembro en Sète.

\*\*\*\*\*



IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/IDEOJ/

Unumonata migra feriado precipe perbicikla...dum la somero de 1992.

Projekto proponata al nia federacio de Jorgos.

Generala organizanto: "Amis des Cyclo-Espérantistes" 67660 Betschdorf

Kiel ĉiuj scias, la jaro 1992 gravos por la konstruado de Eŭropo. Pro tio la ideo vivigi kune 16 gejunulojn (12/18-jarajn) de ĉiuj membro-landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumaro (ne pli ol 3 el la sama lando). Akompanos 4 gegvidantoj pli ol 18-jaraj, el malsamaj landoj; minimume 3 el ili estos E<sup>o</sup>-parolantoj.

La feriado estu dividebla en 4 apartaj semajnoj: a)esperanta b)natura c)sporta d)kultura. En 7 tagoj kaj pli-malpli 300 kilometroj, la gejunuloj ĉion eblan malkovros, spertos, inter-ŝanĝos pri la faka temo, kaj espereble pli konsciiĝos pri sia eŭropaneco.

Ili pagos certajn kostojn, sed ACE klopodos ricevi apogon kaj financon subtenon de la Regiona Konsilantaro, de la Eŭropa Konsilantaro, eble ankaŭ de departementaj, urbaj, ktp. Dum nia venonta federacia kongreso ni diskutos pri tiu projekto, kiu estos proponata al alia federacio, se ni malkonsentos.

Se vi jam antaŭvidas kunlabori (ĉefe en la lingva kampo per tradukadoj sed ankaŭ per lokaj apogoj), anoncu vin ĉe SFS kun precizaj klarigoj pri interesoj/eblecoj, datoj, ktp.

\*\*\*\*\*

## FERII EN HUNGARIO.



La 22an fojon okazos la Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN) en Abaliget, vilaĝo kaj ripozloko en la suda parto de Hungario kun arbaroj, lagoj. Riĉa programo atendas vin: naĝado, migrado, ekskursoj, E<sup>o</sup>-kursoj, surlaga nokta boatado kun lampioj, ludoj, balo, ktp. Esperanto estas praktikebla de frumateno ĝis noktomezo! Datoj: de la 15a ĝis la 24a de Julio.

Kotizoj (ili inkluzivas manĝojn en loka restoracio):

en somerdometo kun duŝejo, 1 aŭ 2-lita ĉambro: 4000 Ft aŭ 170 NLG =  $\pm 515$  FE (somerdometo ankaŭ taŭgas por 3-4 personaj familioj)

en ĉambro 2lita: 3500 Ft/en 12,20-lita ĉambro: 2700 Ft/en propra tendo: 2200 Ft.

\*\*\*\*\*



# EUROKKA



La universala lingvo por kulturo sen limo

Eurokka estas Esperanto-Rok'asocio, kiu okupiĝas pri la administrado de lokoj por trejni rok-grupojn sed ankaŭ celas promocii esperanton ĉe gejunuloj per la E<sup>o</sup>-rokmuziko.

Ĝi organizas E<sup>o</sup>-rokkoncertojn, turneojn, kursojn, staĝojn kaj elsendas esperantajn programojn de loka roka radio-stacio (dum duon-horo ĉiun merkredon je la 13a h. kaj ĉiun sabaton je la 10a $\frac{1}{2}$ , apud Tuluzo). Adreso: 31450 Donneville Tel: 61-81-95-65.

\*\*\*\*\*

Flanke de Eurokka aktivas en Tuluzo grupo da gejunuloj, ankaŭ ĉe la Universitato. Pri ĝi raportos en Lézignan Brigitte Hénin.

\*\*\*



Vi certe memoras pri la klopodoj de alia junulo, Alexandre Rousset, por fondi komercan entreprenon, kiu uzas esperanton (adreso: 9, Rue de L'Eglise 95520 Osny).

Interland nun proponas traduk-servon (ekzemple en la japanan pere de japanaj esperantistoj) aŭ kontaktojn en diversaj landoj (ekzemple por aperigi anoncon en la gazeto de iu fora lando kaj ricevi la tradukitajn respondojn), aranĝojn de vojaĝoj kaj eble baldaŭ DLT, tiun programon de Nederlanda firmao por aŭtomata tradukado. Vi-mem povas konigi INTERLAND al interesataj personoj.

\*\*\*

Jorgos estas la sekretario de nova asocio ACE (35, Gde Rue 67660 Betschdorf aŭ kutima adreso: 12, Place Picasso 66400 Céret). Tiu asocio ankaŭ akceptas aktivajn membrojn.

Je la dato de tajpado de SFS, Jorgos organizas la prelegvojaĝon de dana artistino,

"Else-Grete", aŭ pli precize li kontaktas la grupojn, kiuj pretas ŝin akcepti.

"Else-Grete" vizitos nian landon en Februaro kaj Marto. Ni deziras al ŝi agrablan vojaĝon.

\*\*\*

Se vi regule aŭskultas E<sup>o</sup>-radioelsendojn, ĉu vi scias, ke de kelkaj semajnoj elsendas RADIO HAVANO/KUBO ĉiudimanĉe. Adreso: p.k. 7026 Havano

Horoj por Eŭropo kaj Mediteranea regiono: a) 1840-1900 utc b) 2200-2220 utc

Frekvencoj: a) 15155 (19m80), 11950 (25m10), 11800 (25m42) b) 15155 (19m80), 11950 (25m10)

La 5an de Aùgusto, la eùropa karavano, inkluzive de 23 Francoj, ekflugis el Bruselo por partopreni la 6lan SAT-kongreson. Post halto en Dakar, la aviadilo de la paragva-ja kompanio ne povis, pro ne taùga vetero, alteriùgi en Aùncionon, kaj ni devis iri kelkajn horojn en Argentinon antaù ol trafi tiun urbon, el kie per iu DC8 ni fine atingis San-Paùlon. Tie aùtobuso prenis nin ðis la kongresurbo Campos do Jordào, kaj la "Parke Hotel" akceptis nin por kongresi, manùgi kaj dormi. La San-Paùlanoj, kiuj organizis la kongreson, kaj aliaj Brazilanoj, kun varma bonveno akceptis nin. Kiam ni eniris niajn çambrojn, ege surprizis nin la malvarmo. Çu ni vere estas sur la Tropiko?... Neniu varmigilo ekzistis krom la akvo de la duùo. Campos do Jordào estas çarma turista urbeto je 1700 m. super la marnivelo en la Serra da Mantiqueira, kaj niaj çambroj, en la hotelo apogata norde al la monto, ne povis ricevi la sunradiojn.

Inter la 127 ge-sat-anoj plimultis la Brazilanoj ol la Eùropanoj kaj aktivaj kaj entuziasmaj brazilaj gejunuloj ðojigis la etoson. La kongreso disvolviùgis kiel kutime. Ni havis çiumatene laborkunsidojn aù Cseh-seminarion gvidatan de Mila Van der Horst kaj çiuposttageze aùtobusan ekskurson dum du horoj kaj poste interesan prelegon ðis la vespermanùo. La kongrestemon "Esperanto kaj Sat en la tria mondo" oni traktis dum 3 kunvenoj. El la prelegoj mi pli ðatis tiujn pri "Zamenhof kaj Sennaciismo" de Zofia Banet-Fornalowa, de Y. Peyraut: "Çu la religio neas la individuon?", kaj de Ledon pri "Evoluo de la homekspluatado".

Tuttaga aùtobusa ekskurso kondukis nin al San-Paùlo, urbego de 8 milionoj da enlo-ùgantoj, kiu okupas tiel vastan areon kiel Meksiko sed kun centro el densaj çielskra-pantoj. Ni çirkaùis ðin laù la periferia vojo kaj vidis multajn favelojn, kiuj ðajnis al mi malpli mizeraj ol tiuj de Meksiko. Post traïro de la grandioza "Universitata urbo" kaj vizito al la interesaj "instituto pri esploro" kaj serpentejo, ni eniris la manekenan fabrikan de la kamarado Ledon. Sao Paùlo ne plaçis al ni : tre granda urbo sen multe da interesaj lokoj.

Çiuvespere okazis, çu en la kulturdomo, çu en la kongresa salono, teatrajùoj, folklo-raj muzikoj kaj dancoj, varieteoj, kies lasta estis la plej amuza. Dum la ekskursoj ni povis ðui la çarmajn pejzaùojn de la "Serra" kun la belaj aùrokarioj.

Sed finiùgis la kongreso kaj ni adiaùis kun iom da emocia bedaùro niajn brazilajn kaj argentinajn geamikojn por nia postkongresa vojaùo. Nur Ledon akompanis nin kiel tradukisto de nia akompananto-gvidisto, kiu parolis nur portugale.

Survoje al Brazilia ni haltis en Uberaba el kie oni invitis nin por pasigi tagon en "fazenda", t.e. farmbieno tute izolita en la savano de la altebenaùo. Tie oni regalis nin per nekonataj fruktoj kaj legomoj, bongusta bubalaùo (ili mortigis bubalon por ni) kaj diversaj vinoj aù fruktsukoj. Ni admiris la belajn zebuojn, gustumis ðus melkitan lakton de bubalino kaj kelkaj galopis en la savano sur belaj brunaj çevaloj. Kun bedaùro ni forlasis niajn tiel çarmajn kaj bonkorajn gastojn, kiuj eç donacis al çiu el ni iun esperantan romanon kun dediçaj vortoj.

Kvankam mi antaùe multon legis pri la urbo Brazilia, mirigis min la maldenseco de la kvartaloj. Oni povas veturi dum pli ol kilometro en la centro de la urbo sen vidi eç unu domon!... Oni renkontas ne nur grandegajn belajn parkojn sed eç veran nekulturi-tan savanon. El la fenestro de la 8a etaùo de nia "Torre Palace Hotel" mi rigardadis la trafikon sur la larùaj stratoj, kiuj kurbiùas, pasas sur aù sub multajn pontojn sen iu kruciùo. Brazilia ne konas la ruùajn lumojn... Stranga urbo en formo de aviadilo, kies aloj iom kurbaj finiùas en 2 ðardenoj : la botanika kaj la animala.

Lagoj kaj basenoj reflektas la monumentojn. La Palaco de la Kongreso surprizas per siaj du altaj kvadrataj kolonoj flankitaj de la kurbaj linioj, konvekso kaj konkavo de la tegmentoj de la 2 Asembleoj. Ankoraù pli moderna kaj stranga ðajnas la katedralo, tiel malsimila al niaj eùropaj preùejoj, kun siaj kvar sonoriloj ekstere, kaj kontraù la 4 altaj nigraj statuoj de la evangeliistoj kaj la grandaj, blankaj ovalaj hostioj.

Dua agrabla surprizo atendis nin en Brazilia : vespera invito en la hejmo de esperantisto kun kelkaj amikoj, kiu regalis nin per delikataj manùaùoj kaj trinkaùoj.

Nur malsukcesis nia provo proksimiùgi al Amazonio, çar ni renkontis survoje al Belem, dum 200 km, la saman savanon kun la samaj vagantaj brutaroj, la samaj plantoj, la samaj formikejoj kaj la multegaj termitejoj. Nur revenante ni povis vidi du "garimpeiros", kiuj çerpis kaj kribris la kotan akvon de iu rivero por serçi oron aù diamantojn, çar en tiu regiono "Minas Geiras" la oro riçigis precipe Portugalion dum duonjarcento.

Pli vastaj kulturitaj kampoj kun kelkaj traktoroj; kaj eùkaliptaj arbaroj vastiùgis inter la çefurbo kaj Belo Horizonte. Tiu urbo bone meritas sian nomon. El la supro de la monto de iu riça kvartalo, la panoramo sur la urbo estas belega. Sur la kontraùa

ankaŭ riĉa kvartalo Pampulla ni vizitis la kovritan piedpilkejon, laŭdire la dua en la mondo laŭ la vasteco.

En la proksimeco, Uro Preto, kies nomo signifas "nigran oron" (la plej valora), estas muzea urbo, protektata de la ŝtato, je 1160 m. inter du montoj. La malnovtipaj domoj kun ruĝaj tegmentoj alkroĉiĝas sur la flankoj, laŭlonge de la stratejoj pavumitaj per rondaj ŝtonoj. Bedaŭrinde pro la vintro ni ne povis ĝui la blujn florojn de la "jacarandas". En la apuda urbeto Sabara ni vizitis la preĝejon, kiu laŭdire entenas la plej grandan kvanton da oro. Kiel multaj en la regiono, ĝi estas fortikigita kaj restas fermata por malkuraĝigi la ŝtelistojn...

Post reveno al Belo Horizonte, ni havis interesan vesperan renkontiĝon kun la granda esperanta grupo de la urbo. Reĝis ĝoja, simpatia etoso kun kantoj kaj gitaroj. Ni multe babilis pri la vivo en Brazilo, pri la 20%a inflacio ĉiumonate (dum la nunaj 3 monatoj, poste la ciferoj verŝajne pligraviĝos), dum la ŝtataj funkciuloj, kaj nur ili, ricevas 17% plialtigitan salajron. Kiamaniere sukcesas vivi la aliaj?

Antaŭ Rio-de-Janeiro ni sekvis aŭtovojon, kies du direktoj disiris en la montoj tre malproksime unu de la alia. Post traire de multaj pintoj similaj al la "Sukerpano" de Rio, ni atingis la urbon kaj la oceanon. Ni devis trapasi tunelojn antaŭ ol trafi nian hotelon "Sao Conrado", proksime de la samnoma plaĝo. Nun ni povis admiri la plej belan urbon de Brazilo, aŭ ĉu eble de la mondo? El la "Sukerpano" kaj pli amplekse el "Corcovado", kie la Kristo de 38 m. etendas la brakojn super la urbon kaj la golfon, mirinde bela estas la panoramo. Kvankam mi opinias iom troigita la famon de la plaĝo "Copacabana", ĉar simile belaj estas la aliaj plaĝoj, la grandioza golfo kun ĝiaj insuletoj, la montopintoj malantaŭ la domegoj kreas belecon verŝajne raran en la mondo. Mankis nur por mi la floroj de "flamboyants" (kiu estas la esperanta nomo?). Volonte mi vivus tie!

Sed tie finiĝis nia rondiro kaj ni devis reiri al San-Paŭlo por la reveno al Eŭropo. Ni veturis laŭ la tre bela marborda vojo kun la golfetoj, la insuloj, la verdaj montoj: lastan plezuron por la okuloj Brazilo donis al ni. En San-Paŭlo okazis adiaŭa vespero ĉe la familio Ledon, kiu regalis nin per diversaj delikataĵoj. Grandan koran dankon al ili kaj al ĉiuj kongres-organizintoj pro tiu sukcesa kongreso kun multaj agrablaj surprizoj.

Nun restas al ni la memoro, ne nur de la vidindaj pejzaĝoj aŭ de la bruligo de la malbonaj herboj en la savano aŭ la arbaroj, sed de la bonkoraj geamikoj. Tiu Sat-kongreso kuraĝigas min pri nia movado pro la juneco de la Brazilanoj, kiuj lernas kun entuziasmo nian lingvon. Ili nur daŭrigu!

M.M.



## SAT-AMIKARA KONGRESO

*Kiel jam indikite en SFS, la venonta Sat-Amikara Kongreso okazos en nia regiono, en Pézenas, de la 25a ĝis la 27a de Marto.*

*Informas: Nereida Martinez 8, Rue du Tour de l'Eglise  
Celleneuve 34080 Montpellier.*

*La kongreso okazos en LEP (Liceo Profesia) Chemin de la Fraissine  
Kongreskotizo: membro: 100F Gasto: 140F*

*Diversaj loĝeblecoj: dulitaj ĉambroj en hoteloj, kvinlitaj  
ĉambroj en Campotel, tendumejo/karavanejo.*

*370 F por ĉiuj tagmanĝoj kaj vespermanĝoj.*

*La bankedo okazos dimanĉon tagmeze.*

*Ekskursoj: -dimanĉon posttagmeze: la malnova urbo Pézenas  
-mardon tuttage: al Nissan, marbordo ĝis Sète kaj Mèze*

\*\*\*\*\*

*Ni deziras al Sat-Amikaro bonan kongreson en la urbo de Moliero  
kaj esperas, ke iu bonvolos raporti por "Sudfrancia Stelo"*

\*\*\*\*\*




KRUCVORTOJ de René Raynaud

Horizontale:

I.Varma somero favoras lian negocon(R).II.Vesto  
 III.Malofta inter kato kaj hundo(R).Orienta brando sed inversite(R).IV.Regnestro.  
 Intensa plezuro(R).V.Inversi-  
 -ta pronomo.Provizora konstruo  
 VI.Meze de gluteo.Vosto de salikoko.Rivereto (de dekstre maldekstren).VII.Pli timemaj ol ranoj.Inversita interjek-  
 -cio esprimanta bedaŭron.VIII Tiu de Scott al Suda poluso ne estis tiu,kiun sekvis Admunsen(R)  
 IX.Hejmveo.X.En tiu monto(R)mortis Heraklo.  
 Ejo kun difinita destino.

R= Radiko



Vertikale:

1.Plaĉa knabino.2.Floretoj, kiujn oni kolektas en herbejoj ĉirkaŭ Pasko.3.Komuna al toreadoro kaj al matadoro.  
 Pecetigi aŭ pulvorigi (R).  
 4.Por briligigi.Kalkulo (R)  
 5.Komenco de individuismo.  
 Norda(R).6.Eksterigi sian kapablaron(R).Prepozicio.Rando de ŝtofo.7.Ludkartoj.Du konsonantoj en gratifiki.8.Rilataj al latinaj popoloj.Posesivo.  
 9.Musosimilaj mamuloj.Duone maljuna.10.Portugala insularo.

\*\*\*

ANAGRAMOJ (R.R.) Trovu anagramojn de la ĉi-subaj vortoj, tiel ke la unuaj literoj legitaj de supre malsupren donu nomojn de

Mediterranea fiŝo

Tasko	KOSTO
Truso	.....
Kario	.....
Grizo	.....
Violo	.....
Farto	.....
Grano	.....
Sirio	.....
Verso	.....
Ferio	.....

Medikamenta likvoro

Kareno	.....
Telero	.....
Tempio	.....
Barako	.....
Taluso	.....
Talioj	.....
Pirozo	.....
Baloto	.....

Fama raguo

Barako	.....
Galino	.....
Kareso	.....
Turkio	.....
Rilato	.....
Denizo	.....
Letero	.....
Baloto	.....

Provenca supo

Ribelo	.....
Kuseno	.....
Lupeoj	.....
Piralo	.....
Lobeto	.....
Merito	.....
Trusto	.....
Konato	.....



K.....


LIMDATO POR LA VENONTA NUMERO:

LA 4a DE MARTO. Atentu la daton!

A CHACUN SA DATE



Quelles sont, parmi toutes celles proposées, les dates comprises entre l'année de naissance et de décès du personnage concerné ?



A	1859
B	1862
C	1880
D	1890
E	1917
F	1919
G	1940
H	1950

Solution: L. L. Zamenhof  
 créateur de l'Espéranto  
 A - E: 1859 - 1917

La apuda divenaĵo aperis en "Midi Libre" la 7an de Novembro, kadre de ĉiutaga ludo, kie estis divenendaj la datoj de famaj homoj. L-L.Zamenhof estis la lasta de la serio. J.A. estis sendinta la portreton far R.Rossetti. Certe niaj legantoj trovis la solvon!

Solvo de la krucvortoj de la numero 106a:

I.Kastanjetoj.II.Amfiteatro.III.Tuilierioj.Re.  
 IV.Aln'.Ie.Sek'.V.Pekis.Korekt'.VI.Lts.Tangento  
 VII.Ao.Kokain'.VIII.Sj.Rodi.IX.Nutri.Erar'  
 X.Pistol'.Visk'.XI.Diet'.Molusko.XII.Ploroj.Oo.  
 1.Kataplasm'.2.Amuletoj.Pip'.3.Sfinks'.Niel'  
 4.Til'.Krusto.5.Ateisto.7t.Nere'.Ak.Romo.7.Jai.  
 Knariloj.8.Etologio.9.Trj.Rendevuo.10.Oo.Sen'  
 Iriso.11.Rekta.Ask'.12.Vekto.Arkoz'

Mozaiko:Kiu ne vidis Avinjonon en la tempo de la Papoj vidis nenion.

Proverbo:Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto.  
 Azeno, leporo, ĉevalo, ibiso, urso, hovino, erinaco, strigo, turdo, omaro, papago, lacerto, abelo, ĉamo, angilo, sciuro, ĝirafo, Izatiso, Aglo, Najtingalo, Elefanto, Struto, Testudo, Ostro.

FELIĈAN NOVJARON